# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

Jaargang
Jarkolekto 3 - N° 3 - Ma/Apr 1983

N o t e n d a j o j

23 04 1983 : Kadrokurso pri KOMUNIKADO. Gvidos Anne Tilmont

28 05 1983 : Kadrokurso pri TRADUKADO. Gvidos Petro De Smedt.

~~28 05~~ 1983 : Konferenco "Vid'al la 100-jara Jubileo" okazonta en
4 06 Vlaardingen, Nederlando.
Tiu ĉi konferenco okazos kadre de la Flandra/Nederlanda kunlaboro. Kunlaboros en ĝi, tiel membroj de FEL kiel de la Nederlanda Esperanto-movado.
Info : J. Bovendeerd, 03/449 50 06

28 05 1983 : Geedziĝo de Annie Bollaert kaj Herman Deceuninck.
Nova adreso ekde tiam (do, ankaŭ de la Gazetara Servo)
Lu[illegible]izenlaan 1 b.4, 1500 HALLE

04 - 10 06 1983 : Oostende : 35-a IFEF-kongreso.
Info : L. De Sutter, Pijnbomenweg 4, 1180 BRUSSEL

Pro manko de la necesaj informoj la organigramo de FEL ne estas preta. Se la ankoraŭ-ne-respondintoj al nia alvoko alsendi al ni la demanditajn informojn ĝustatempe respondos, la organigramo estos aldonita al la sekvonta numero de INFORMILO.

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto.
Jarabono : BF 150,-

---

| | |
|---|---|
| FLANDRA ESPERANTO-LIGO | Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00<br>Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 |
| Prezidanto<br>Informado/Planado/Agado | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT - 03/666 62 66 |
| Estrarano pri Financoj | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97 |
| Sekretario | Jan BOVENDEERD, Speel[illegible]nlaan 14<br>2510 MORTSEL 03/449 50 06 |
| Direktoro de GCA<br>Librotenado | Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN |
| Junularo | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL 03/449 50 24 |
| Intergrupa Agado | Hilde Van INGELGEM-VANDRIESSCHE , Arbeidstraat 21<br>9300 AALST<br>Trees DOOMS, Knaptandstraat 36<br>2700 St. Niklaas |
| Provincaj prezidantoj | Brabanto : M. Th. HENQUINEZ, Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK<br>Limburgo : Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN 011/53 64 10<br>Okc. Flandr.- Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE 050/33 00 04 |
| Kadrokursoj | André STAES, Jan Denu[illegible]traat 1/19[illegible]<br>2020 ANTWERPEN |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN |
| Gazetara Servo | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b.4, 1500 HALLE |
| Sciencoj | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT |
| Cibernetiko | Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT |



PROTOKOLO pri la estrarkunsido de 05 03 1983 en Antwerpen.

Ĉeestas : R. De Schepper (RDS), K. Tytgat (KT), T. Dooms (TD), P. Peeraerts (PP)
H. Van Ingelgem (HVI), J. Verstraeten (JV), E. Symoens (ES),
M. Van den Bempt (MVD)

Petis senkulpigon : J. Bovendeerd (esperantaj taskoj)

Komenco : 14.15 h.

Prezidas : E. Symoens

1. Kontrolo de la protokolo pri la estrarkunsido de 05 02 1983.
   Ivo Durwael avertis ke lia interveno en kiu li petis anstataŭigi la membro-kotizojn per donacoj, ne troviĝas en la protokolo. Ĉar tiu ĉi propono neces-igas profundan priparolon (statutŝanĝoj, rilatoj kun AVI, leĝaj preskriboj) oni remetos tiun ĉi punkton sur la tagordon de la venonta estrarkunsido.

2. Raportoj de la ĉeestantoj.
   PP avertas ke denove la membraro ŝajnas fali. Al izoluloj la Centro ĵus for-sendis memorigon, al aliaj ĝi tion faris pere de la grupaj kasistoj. Se la grupoj ne reagas, la Centro okupiĝos pri tio. Tamen ŝajnas ke almenaŭ kelkaj grupoj jes uzas la listojn por rekapti perditajn membrojn.

3. Financoj.
   RDS preskaŭ finis la subvencidosieron. JB nun ĉeestas "hoorzitting" pri la subvencioj ekde 1984.

4. Estonta agado.
   La venonta estrarkunsido okazos en Kortrijk matene. Posttagmeze estos ren-kontiĝo kun la grupoj el Orient-Flandrujo. Kiel memorigo : la dato estas la 9-a de aprilo.

   PP reprenas sian iaman proponon, ke FEL kreu iun gvidlibron por la grupoj pri grupa agado. TD pretas okupiĝi pri tio.

   TD krome volus organizi kunsidon nur kun estraranoj de grupoj. ES atentigas ke oni tre zorge preparu ion tian por ne kaŭzi konfuzojn. TD pripensos kaj denove raportos pri siaj intencoj. La punkto revenu sur la venonta tagordo.

5. Venonta jarkunsido.
   Oni ne tro emfazu la grandecon de la deficito por ne timigi la membrojn. Nur supraje estu priskribitaj la monaj malfacilaĵoj de la Ligo.

   Estraro : RDS pretas resti en la estraro sed nur kun la nuna limigita tasko pri buĝetado.

   Ĉu la grupoj jam menciis siajn novajn administrantojn ? La grupoj decidu

dum la jarkunsido ĉu ili volas daŭrigi la novan sistemon de kotizperado. PP provos efektive prilumi por la kunsido la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu sistemo.

La tagordo jene aspektos skize :
- aprobo de antaŭa raporto
- raportado
- honorigo
- elektoj
- nova kotizosistemo
- agadplano.

6. La estraro de FEL unu fojon pli atentigas la estraron de SONORILO, ke ĝi tuj prenu sian respondecon rilate la malbonan funkciadon de la libroservo "Sonorilo". La nova estraro de FEL elektu reprezentanton kiu ĉeestu la kunsidojn de la estraro de SONORILO.

7. Kongreso en Leuven.
MVD prezentas la duan buĝetproponon (vidu aldonon). Pri la financa rezulto decidiĝas, ke eventualan perdon kovros FEL. Gajnon dividos inter FEL kaj ESPERANTO 2000 laŭ la rilato 50/50.

8. Kontrakto FEL/Institucio Hodler.
La kontrakto estas subskribita surloke.

9. Letero de Ivo Duwael.
La estraro ricevis peton de ID esti senŝarĝita kiel komisiito pri Volontula Servo. Ĉar li tamen aŭtomate eksiĝos okaze de la ĝenerala jarkunsido, la estraro proponas ne fari iun decidon nun, sed konsili al ID simple ne plu kandidatiĝi okaze de la jarkunsido, se li tion deziras.

10. Diversaĵoj.
JB informas ke la grupo de Deurne ĉesas ekzisti. La membroj (5) aŭtomate transiros al LA VERDA STELO.

JB klarigos dum la ĝenerala jarkunveno ke grupoj malpli al 10-membraj kostas al FEL multe pli ol ili enspezigas. Li provos persvadi al malgrandaj grupoj fari kiel la grupo de Deurne.

Fino : 17.00 h.

Protokolis P. Peeraerts.

--------------------



PROTOKOLO pri la ĜENERALA JARKUNSIDO de 19 03 1983 en Antwerpen.

La listo de la ĉeestantaro estas havebla de la sekretario.

Senkulpiĝon petis : P-ro A. Beckers kaj G. Schroeyers

Prezidas : Edw. Symoens
Protokolas J. Bovendeerd.

Komenco : 14.10 h.

En sia enkonduko, la prezidanto, post la kutima bonvenigo, klarigas ke la preparo de la kunsido ne estis ekzempla. Ĉefe kulpas pri tio la UK kaj la postkongresaj laboroj kaj reguligoj.
Rilate al la UK li anoncas ke la kongresa gajno sumiĝas je ± 60.000 gld, kiuj do estos distribuitaj inter la diversaj rajtantoj.

T A G O R D O

1. La protokoloj de la ĝeneralaj kunsidoj de 13 03 82 kaj 16 10 82 estas aprobitaj.

2. Raportado

2.1. Financoj.

2.1.1. P. Peeraerts klarigas ke ankoraŭ ne estis eble egaligi la kontojn. La deficito jes estas malpli alta ol la pasinta jaro, kio ja estas pozitiva konstato. La revizoro de la ŝtato trovis la librotenadon en ordo kaj konstatis ke la perdo sumiĝas je ± 300.000 BF.
En la bilanco la plej peza ŝarĝo estas la salajroj. Malpliigo de tiu ero estus ebla pere de la Volontula Servo.

2.1.2. Reagoj el la publiko :
- L. Demesmaeker : Inviti la mebrojn al pagado de po 100 F. monate.
- PP kaj JB : Tio jam fariĝis antaŭe kun ĉiuj eblaj klarigoj kaj formularoj. Reagis tamen nur 2 personoj !
- FR : Kiel funkcias la Centro kaj la E°-domo ?
- PP : La "domo" kiu apartenas al Instuticio Hodler havas tri luantoj : UEA, FEL kaj LA VERDA STELO. La Centro laboras por UEA, kiu ankaŭ pagas la salajrojn. La Centro ankaŭ laboras por FEL kaj estas por tio fakturita de UEA.
- I. Durwael :
- konstatinte sufiĉe grandan alfluon de Esperanto-interesiĝintoj kiuj ricevis/as 6-monatan abonon al ESPERANTO PANORAMA kaj la perdon

de tiuj personoj pro ne plua ricevo de la revuo krom se ili reabonas ĝin
proponas agadi kiel ekz. BOND ZONDER NAAM (Movado sen Nomo), kiu sendas seninterrompe siajn sloganojn al ĉiu kiu iam petis tion, sen peti ian ajn kotizon. BZN lasas al la ricevantoj de la sloganoj libervolan donacpagon kaj tiel enspezas multe pli ol eblus per fiksaj kotizoj.
BZN atingas tiamaniere ± 250.000 personojn en Flandrio kaj vidas kreski sian membraron de monato al monato La dissendo de la sloganoj kostas al BZN ± 20.000.000,- F. jare.
ID, do, proponas ekzameni la eblecon forstreki la devigajn kotizojn kaj transiri al la donaca sistemo kaj al daŭra alsendo de nia revuo (Esperanto Panorama). Tio havas alian avantaĝon, nome atingi ĉiam pli da homoj anstataŭ nur la 5-600 pagintajn membrojn.

ID estas alaplaŭdata. JB promesas priktraktigi la aferon en la estraro en tiom da kunsidoj kiom necesas por trovi taŭgan solvon.

2.2. Intergrupa agado.

La komisiono gvidata de Hilde Van Ingelgem kaj Trees Dooms reenstalis la provincajn ĝeneralajn kunsidojn kaj priesploras la eblecojn por plibonigi la intergrupan agadon.
Unua provinca kunveno jam okazis en februaro en Aalst (Orient-Flandrujo).
Dua okazos en aprilo en Kortijk (Okcident-Flanrujo).
La aliaj provincoj sekvos.

2.3. Literaturo/tradukado. (raportas PP pro malĉeesto de Chr. Declerck)

Ĝis nun 4 manuskriptoj envenis el kiuj 3 ricevis negativan prijuĝon kaj 1 pozitivan.
Dependos de nia eldonkapablo por realigi la eldonadon.

2.4. Informado (ES)

Ne ĉiam estas eble - ankaŭ ne necese - apartigi la aktivecon de membro de la komisiono pri informado de UEA kaj de respondeculo pri informado de FEL. Unu kompletigas la alian, ni eble tro ofte forgesas tiun interrilaton.
Mi jam havis la okazon klarigi al vi miajn ideojn pri informado. Ĉi tiu tre ofte estas hazarda, okaza, limigita, vertikala. Memkompreneble, ĉiuj formoj kaj okazoj de informado nepre estas bonvenaj, sed tio ne sufiĉas por antaŭenigi nian aferon iom pli rapide. Pluraj sociaj tavoloj ĝis nun estis apenaŭ sisteme prilaboritaj kaj tamen pluraj el ili povas esti decidaj por nia progreso.
En du seminarioj en Roterdamo kaj unu en Bad-Saarow, plurnaciaj delegitoj



konsentis pri kvin prioritataj sektoroj prila-borendaj :
- amaskomunikiloj
- socipolitikaj medioj
- pedagogiaj kaj edukaj instancoj
- scienco kaj teknologio
- turismaj medioj

Dum la UK en Antwerpen, mi enkondukis rezolucion kiu estis akceptita de la komitato la 26-an de julio. Mi bedaŭrinde ne scias ĉu la estraro de UEA pritraktis ĝin.
Laŭ mia projekto ni devas agi posektore, samtempe, amase kaj translime en kiel eble plej multaj landoj, surbaze de identa skemo kaj identaj informaj dokumentoj, nur adaptitaj al la lokaj aŭ naciaj cirkonstancoj.
La estraro de UEA principe konsentis, sed tio ne sufiĉas. Ĝi devas alskribi la landajn asociojn - aŭ komisii iun tion fari - por oficiale klarigi la celon kaj la strategion de la operacio. Mi proponas ke ni ne plu atendu kion aliaj faros, sed ni preparu tiun informkampanjon en nia lando, en ambaŭ lingvokumunumoj.

MI KONKRETE NUN PROPONAS KE NI TUJ STARIGU MALGRANDAN LABORGRUPON POR ĜISFUNDE PREPARI LA OPERACION, ĈAR SOLA MI CERTE NE POVOS FARI LA LABORON.
KIU DEZIRAS AKTIVE KUNLABORI ?

Tiu laborgrupo devos :

1. trastudi la orientigajn leterojn kiujn mi jam preparis nederlandlingve kaj destinotajn al la ministro pri instruado, la inspektoroj, la lernejestroj, la prezidantoj de gepatraj asocioj, la prezidantoj de la Senata kaj Ĉambra komisionoj pri edukado ktp.

2. fari aŭ farigi la aldonotajn dokumentojn. Mi pensas pri :
   a. broŝuro pri Socipolitika, pedagogia kaj kultura valoro de Esperanto, kiun mi verkis kaj kiu baldaŭ aperos esperantlingve en La Chaud-de-Fonds. La nederlandan tradukon faris Rik de Roover kaj tiu teksto nun estas tralegita kaj preparita por eventuala eldono. S-ro Roger Yafil el Francujo nun faras la francan tradukon.
   b. superrigardo pri la universitatoj en kiuj Esperanto estas regule instruata. G. Pirlot faris ĝin, sed ni certe bezonas nederlandlingvan tradukon.
   c. broŝureto en kiu la plej oftaj argumentoj kontraŭ Esperanto estas refutitaj, ekzemple rilate la anglan lingvon, la naturecon k.a.
   d. listo de universitataj disertacioj kiuj pritraktas la mondan lingvoproblemon.

Mi posedas unuan liston kompletigotan dum la venontaj monatoj.

e. listo de ĉiuj leĝotekstoj rilate al la oficiala instruo de Esperanto, ekz. el Nederlando, Hungario, Ĉinio ktp.

f. Superrigardo pri la lingvoproblemo en Eŭropo kun la lastaj evoluo kaj tendencoj.

Ĉi tiu listo ne estas kompleta nek deviga. La laborgrupo kritike ekzamenos la proponon.

3. ekzameni la buĝetan aspekton de la tuta operacio.

4. fiksi surbaze de la jam ekzistantaj donitaĵoj la definitivan strategion kaj kalendaron.

Krom tiu longdaŭra preparlaboro, mi sur la kampo de la informado povas komuniki jenon :

1. Mi obstine daŭrigis miajn klopodojn aperigi en prestiĝa lingvistika serio de AIMAV (Association Internationale pour la recherche et la diffusion de méthodes audio-visuelles et structuro-globales) libron pri Esperanto kun kontribuaĵoj el la grandaj naciaj lingvoj (kun resumo en Esperanto) de eminentaj esperantistaj lingvistoj kaj esperantologoj. Mi estas priparolinta la aferon de pli ol 4 jaroj, sed UEA kiu finfine devas decidi kaj subskribi la kontrakton, vere tro hezitis kaj ĉiam forŝovis la findecidon. Estas iom da espero ke ni nun sukcesos realigi tiun gravan projekton, kiu vere mankas inter niaj informiloj je universitata nivelo.
Ĉefredaktoro estas Michel Duc Goninaz, profesoro pri Esperanto ĉe la franca unuversitato en Aix-en-Provence.

2. Mi ankaŭ estas en kontakto kun la universitato en Mons, kie du eminentaj profesoroj konsentas organizi sciencan esploradon pri Esperanto. Mi jam fiksis kelkajn studobjektojn kaj en septembro plej verŝajne kiel unua paŝo startos Esperanto-kurso.

3. Dank'al miaj rilatoj kun "Vrije Universiteit Brussel", kie mi prelegis antaŭ tri jaroj, S-ro Nivette, direktoro de la Lingvoinstituto kaj prezidanto de la 7-a Monda Kongreso en 1984 de la Internacia Asocio de Aplikita Lingvistiko mem proponis al sia komitato organizi en la kadro de tiu kongreso tuttagan simpozion pri Esperanto. Mi mem proponis en tiu sama kongreso prelegi pri la lingva problemo en evolulandoj kaj Esperanto, ĉar la ĉeftemo de la kongreso estas : La kontribuo de aplikita lingvistiko al internacia interkompreniĝo.

4. Mi proponis prelegon pri la lingvo-orientigaj esploroj en Paderborn kaj Budapeŝto al la Katolika Universitato en Nijmegen, kie en septembro 1983 okazos kolokvo pri "Novaj alpaŝoj en la fremdlingva metodologio", organizota de AIMAV.



5. En junio 1982 mi prelegis en la Internacia simpozio pri lingvaj kontaktoj kaj konfliktoj ĉe la universitata fakultato St. Aloysius en Bruselo. En tiu prelego mi disvolvis novan hipotezon pri historia pravigo de Esperanto kaj mi nun klopodas interesigi studenton en iu universitato plue pliprofundigi tiun temon.

Alia medio en kiu mi informadas pri Esperanto estas la Unio de Eŭropaj Federalistoj en Bruselo, de kies komitato mi ankaŭ estas membro.
Eble ke en tiuj medioj mi ne tuŝas amasojn da homoj, sed mi jes tuŝas influriĉajn homojn, kiuj havas multajn rilatojn en ĉiuspecaj socipolitikaj kaj kulturaj medioj.

Por fini ĉi tiun superrigardon mi povas diri ion pri mia informagado en Rŭando, kie mi feriis dum tri monatoj. Entute mi prelegis okfoje antaŭ pli ol 900 personoj kaj kolektis nomon de pli ol 150 Eŭropanoj kaj Rŭandanoj kiuj deziras lerni Esperanton. Estas ampleksa problemo organizi tiun studadon. Pro tio mi fondis Rŭandan Esperanto-Asocion kaj unue klopodas esperantistigi instruistojn, kiuj unuflanke devos instrui la aliajn interesitojn. Unu profesoro de Kinyarwanda de la universitato de Ruhengeri faros studon komparante Esperanton kun sia gepatra lingvo. Ĉie mi renkontis veran entuziasmon, kaj ĉie oni starigis multajn demandojn kaj eĉ kiam mi promenis en Kigali, oni alparolis min pri Esperanto !

Jen do kelkaj aspektoj de mia informa laboro, sed la plej grava estos sukcesigi nian transliman kampanjon ekde venonta oktobro en instruaj kaj edukaj medioj. Se iu deziras estri kampanjon en iu el la aliaj prioritataj sektoroj li bonvolu anonci sin ĉe mi.

ES

2.5. Gazetara Servo (raportas H. Deceuninck)

Agado : Ni partoprenis je 04 12 1982 la studotagon pri kiel argumenti kaj kontraŭargumenti : la rebata servo. (Ni preferus ankaŭ debata servo, ĉar se aliaj batas nin, ni ne volas rebati sed racie debati) Ni provas ankaŭ kontroli, ĉu en la nacilingva gazetaro aperas artikoloj al kiuj ni reagu. Ni konstatas ke ofte artikoloj al kiuj necesas reagi, atingas nin tro malfrue.

Propono : Nia celo estas supozeble daŭre informi la amasmediojn pri Esperanto. Tial ni petas konsideri la proponon de germana aktivulo, nome sendi nian revuon (ESPERANTO PANORAMA aŭ JEN) al la redakcioj de revuoj kaj radioj.

Aperis aro da artikoloj kaj komunikoj en diversaj gazetoj kaj periodajoj dum sufiĉe kompleksa korespondado interŝanĝiĝis kun diversaj redaktoroj kaj gravaj personoj.(kompleta listo estas havebla.)

2.6. Kadrokursoj (raportas JB)

Pri la kadrokursoj respondecas nun alia persono, pli kompetenta ol la antaŭa. Temas pri André STAES (bedaŭrinde malhelpata ĉeesti), sociologo. AS cetere preparas pli kompletan kursoprogramon por la venontaj jaroj. La du unuaj jaroj fakte estis eksperimentaj. La unua 1981/1982 kadre de FEL, kiu arigis 20-o da partoprenantoj, la dua 1982/1983 unuflanke en FEL kun 6-o da partoprenantoj (normale se oni konstatas ke la programo estas la sama), aliflanke kadre de BEF, kiu organizis nian serion en la trilanda angulo Aachen-Liège-Maastricht.
UEA trovis la ideon sekvenda kaj jam diskonigis ĝin pere de ESPERANTO. Jam diversaj landaj asocioj interesiĝis en la afero kaj mendis la tekstojn.

2.7. Kongreso Leuven

M. Van den Bempt anoncas ke ĉio bone progresas. La kotizoj estas fiksitaj, la aliĝiloj pretigataj kaj dissendotaj. La kongreso okazos en la samaj ejoj kiel la festado de la Semajno de Internacia Amikeco, do en pavilono Arenberg.

Ne temas pri FEL-kongreso nek pri BEF-kongreso sed simple pri :
ESPERANTO-KONGRESO PRI EUROPA KOMUNIKADO.

Estos okazo por FEL, BEF kaj APE organizi tiuokaze ĝeneralan kunsidon.

2.8. BEFA (L. De Sutter)

BEFA organizis en aprilo en De Haan komunan ĝeneralan jarkunvenon kun FERN (Nl) kaj interkongresan Terminaran Komisión-kunvenon en kiu partoprenis Aŭstrio, Belgio, Francio, Germanio kaj Nederlando.

BEFA partoprenis i.a. en la Internacia Fervojista Skisemanjo en Morzinnes, la tutsemajna aranĝo de la Ĝenerala Jarkunveno de FFEA en Chartres (F), la Generala Jarkunveno de GEFA (D) en Friedberg, la 53-a Esperanto-kongreso de la Itala Federacio en Forte dei Marmi.
Dum la UK en Antwerpen, BEFA disponigis 3 BEFA-anojn. La du unuaj tagoj ili deĵoris en la stacidomo de Antwerpen, poste dum la tuta periodo en la kongresejo je la servo de la kongresanoj.
Ili ankaŭ organizis gvidatan viziton al la Kontenera Terminalo de Antwerpen kaj gvidatan viziton de la Fervoja Muzeo de Bruselo.

LDS



2.9. FLEJA - vidu apartan raporton

2.10. Raporto de la sekretario (JB)

Permesu al mi ne detale raporti pri la dum-1982-aj okazintajoj, ĉar tion ĉiu jam trovis en INFORMILO.
Altiri la atenton mi volus sur la fakto ke FEL ekzistos kvin jarojn en oktobro ĉijare. Tio signifas ke en la jubilea jaro de ESPERANTO FEL sin preparos al la festado de sia unua dekjara jubileeto. El tio sekvas ke agadi en la programo de UEA pri la 100-jariĝo samtempe estas agadi kadre de nia propra jubileeto. Alivorte, ĉion kion ni faros por UEA, ni samtempe faros por ni mem.
Nu, ĉu ni havas kialojn por esti kontentaj pri tiuj unuaj kvin jaroj ? Ĉu v i estas kontentaj ?
Kio ĝis nun okazis ?
Okulfrape estis la unuaj reagoj post la transpreno de la aferoj depost la kreado de FEL. Ni vere dirus ka niaj membroj estis atendantaj tiun momenton, ĉar, kie antaŭe ni renkontis nur ian ne-interesiĝon, por ne diri malinteresiĝon, tiam subite okazis preskaŭ agadeksplodo. Anstataŭ kunsidoj konsistantaj el unu paroladanto kaj kvanto da (ŝajn)-aŭskultantoj, okazis nun kunvenoj de veraj interesitaj, laborpretaj homoj. Ke komence persistetis ia singardemo, ia retenemo rilate al akceptado de iu estrara posteno, estas tute normale. Ni, la tiamaj elektitoj, ja devis antaŭe pruvi ke ni estas indaj je fido. Tamen, malgraŭ tio, tuja kaj daŭra kunlaboro senhezite aperis ĉiuflanke. Memoru nur la laboron faritan por la kunmeto de katalogo pri Esperanto-verkoj en Flandraj bibliotekoj, por nomi nur unu el la diversaj agadoj. Kion ajn proponitan pluraj pretis bonvole prikonsideri kaj kun-realigi. Iom post iom la interesiĝo en la estrara laboro kreskis kaj spontaneaj kunlaborantoj sin anoncis. Pensu ni pri la kadrokursoj, kiuj nur post multe da penado kaj cerbumado finfine realiĝis kaj en kiuj ni trovis verajn interesiĝintajn aktivulojn. Fine la Universala Kongreso, tiu grandioza evento, kiu fakte permesis al ni konsciiĝi pri niaj veraj fortoj, pri la fakta riĉeco je personvaloroj, pri niaj homfortoj. Dum tiu periodo fakte niaj okuloj malfermiĝis. Homoj, pri kiuj ni antaŭe havis grandan estimon, perdis parton de tiu estimo, dum aliflanke sin prezentis al ni veraj bonvolaj, kompetentaj, laboremaj homoj ĝis tiam nekonatajn. Ekde tiam aperis ĉirkaŭ la kvar-kvinpersona estraro diversaj komisionoj kaj laborgrupoj. Atentu bone, tiuj komisionoj kaj laborgrupoj kunmetiĝis de homoj kiuj sin persone spontanee proponis, kiuj fakte libervole ofertis al ni sian pretan kunlaboremon.
Unua studotago cetere jam okazis en tiu kadro je sabato 4-a de decembro 82 rilate al la gazetara servo.
El tio, karaj amikoj, nia movado ne povas ne profiti. Kun tiuj homfortoj ni devos fine venki. Surbaze de tia fido, surbaze de tia bona volo, surbaze de

tia fortmoviĝo ni ĉiuj kune devos havi sukceson. Tio ankaŭ donos al ni la necesan kuraĝon por persisti, por pruvi nian ekziston, nian forton, nian valoron en la universala socio.
Ke ni havas financajn malfacilaĵojn ne povas esti daŭra bremso sur la agado. La historio donas aliajn ekzemplojn de supervenko de tiaj problemoj. Kiom da ni jam ne konas ekzemple la dum-milita rezistado kontraŭ la invadintaj okupantoj. Tiam mem-evidente ne ekzistis ŝtataj subvencioj. Male, tiuj kuraĝuloj estis persekutataj kaj tamen ili eltenis ! Pensu iom pli fore en la pasinteco, pri la socialaj bataloj. La tiamaj batalantoj gajnis malgraŭ ĉio, ĉar ili kredis en sia afero. Ankaŭ ni venkos, nepre venkos, kondiĉe ke ni kredu. Cetere, ĉu ne estas dank'al la neŝancelebla kredo de L.L. Zamenhof kaj la unuajprioniroj ke la movado eltenis ĝis nun ?
Vi povus diri ke la donitaj ekzemploj ne estas taŭgaj. Akceptite,ĉar ili agadis kontraŭ io, dum ni agadas por io. Jen la diferenco.
Profitemuloj certe estis, certe estas kaj certe estos, sed tiujn ni ne timu. Ilin ni flankenmetu dum ni mem daŭrigu, kuraĝe kaj persisteme, sed..realisme. Monaferoj, kiom gravaj ili ankaŭ estu, ne povos paralizi la movadan vivon. Ke tio estas bone komprenita pruvas la fakto ke intertempe kunvenis jam laborgrupo pri financado kiu serioze priesploris tiom kiom eble da eblecoj al iama solvo de tiu problemo.
Tio kompreneble ne signifas ke ni ne devus interesiĝi pri tio kio haveblas de la ŝtato. Certe ne, ĉar ja ankaŭ ni apartenas al ĝi, ankaŭ ni devas pagi impostojn. Do, ankaŭ ni reprenu tiom kiom eble. Tamen la horizonto rilate al ŝtata subvenciado iom sombriĝis. La kondiĉoj ŝanĝiĝis, iĝis pli severaj en tiu senco ke la kulturaj organizoj pli kaj pli iĝas la respondeco de ĉiuj membroj kaj multe malpli de la nuraj estraranoj. Laŭ la nova dekreto kiu nun estas preparata kaj kiu verŝajne aplikiĝos ekde 1984, subvenci-eblo estos nur kondiĉe ke ni ĉiuj kunlaboru en unu ĝenerala programo. La akcento ne plu troviĝos sur la nombro de lokaj grupoj, sed sur la nombro de aktivecoj. Ekzemple, por havi subvencirajton ni devos organizi minimume 100 klerigajn ("edukativajn") programojn kiuj daŭru po 90 minutojn kaj kiujn partoprenu minimume po 12 personoj. Tiuj aktivecoj devos esti anoncitaj antaŭe kaj akceptitaj antaŭe de la ministerio. Vi jam komprenas ke estonte ni devos alkutimiĝi al daŭra atento, al frua programado, al antaŭa anoncado. Vi nun ankaŭ komprenas ke pro tio nia organizado, nia aktiveco preskaŭ komplete transformiĝos kaj pri tio ni ne kulpas, nek vi. Ni devos alkutimiĝi al daŭra adaptiĝo al la sociaj kondiĉoj kaj tio pli kaj pli oftiĝos, pli kaj pli rapidiĝos. Tia estas tute simple la bildo de la nova socio. Se ni ne preparos nin al tio, ni nin trovos iun tagon en iu rapidfluejo el kiu ni ne plu aŭ nur ege malfacile povos eliri.
Tiom da vortoj por diri nur : "Levu vian postajon el via fotelo kaj eku !"
Kiel jam iasence anoncite, pri la financado de nia agado feliĉe kelkaj pliaj



**flandra esperanta junulara asocio**
vlaamse esperanto-jeugdvereniging

Karaj Legantoj,

1982 estis speciala jaro por la junularo!
Ĝi restos en nia memoro kiel la jaro de la 38a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Leuven kaj de la kvina Jubilea Semajnfino de FLEJA en Lichtaart.
La IJK, la ĉefaranĝo de nia pasintjara Esperanto-agado, bone sukcesis kaj pro la granda laboro, farita de Esperanto-2000, kaj pro la intensa kunlaboro de FLEJA. Eksteren nia landa sekcio povis montri aktivan ekziston, interne ĝi sukcesis kunigi ĉiujn junajn fortojn por tiu konkreta celo, kio estis la IJK.

Okaze de tiu IJK, sed ankaŭ jam antaŭe, formiĝis tuta grupo da aktivuloj, kies kunlaboron ni denove petis por la sukcesigo de la semajnfino en Lichtaart, kaj jes, ili estis pretaj denove labori. Pro tio ĉio mi volas esprimi mian dankon al ĉiuj!

Ĉar tiuj du aranĝoj postulis multe da prepartempo kaj sindediĉo, eble kelkaj aliaj eroj de nia agado riskis esti puŝitaj iom en angulo. Pro tio mi proponas, ke por FLEJA 1983 estu jaro de relativa trankviliĝo, en la senco ke aliaj punktoj de nia agadprogramo ricevu la necesan atenton!

Prezidanto de FLEJA

ESTRARA RAPORTO DE FLEJA, PREZENTITA DUM LA JARKUNVENO 6.03.1983

ENHAVO

1. Estraro kaj Taskitoj
2. Membreco
3. Financoj
4. Rilatoj
   4.1. Rilatoj kun TEJO
   4.2. Rilatoj kun FEL
   4.3. Rilatoj kun NEJ
   4.4. Rilatoj kun BEMI
   4.5. Rilatoj kun AFS
5. Kunsidoj
6. Interna informado
   6.1. En la estraro
   6.2. JEN
   6.3. Koncize
   6.4. Interŝanĝoj
7. Oficejo
8. Renkontiĝoj
9. Eksteraj rilatoj - Varbado
10. Diversaĵoj
11. Konkludo
12. Uzitaj mallongigoj

1. Estraro kaj Taskitoj

Elektitaj dum la jarkunveno la 7an de marto 1982 en Antverpeno:

1.1. Estraro (taskdivido dum la estrarkunsido de 7.05.82 en Antverpeno):

Prezidanto: Kiki Tytgat (+ Interna informado)
Financoj: Wim Tytgat (buĝeto)
Sekretario: Jean-Pierre VandenDaele
Kasisto: Ite Tytgat
Administranto: Gerd Jacques
Eksteraj Rilatoj: Ilse Jacques
Membro: Jan Erreygers

En Lichtaart (1.11.82) Gerd Jacques demisias.

1.2. Taskitoj:

Pasporta Servo: Ite Tytgat - Libroservo: Ite Tytgat
Redaktoroj: JEN: Herman Deceuninck; EK/kasedoj por blinduloj: Anne Tilmont; Koncize: Wim Tytgat
Revizoroj: Myriam Ruyssinck kaj Kris Suykens.

1.3. Rilatoj:

IJK: Wim Tytgat kaj Jan Erreygers
UK: Gerd kaj Ilse Jacques
TEJO: Gerd Jacques kaj Kiki Tytgat
FEL: Kiki Tytgat
NEJ: Gerd Jacques

1.4. Ekde la jarkunveno 1982 validas la aprobita interna regularo.





2. Membreco:

2.1. Membrokategorioj 1982:

| Kategorio | Kotizo | Ricevitaj periodaĵoj |
|---|---|---|
| Membroj | 100 BF | JEN, Esperanto-Panorama |
| Patronoj | ekde 500 BF | JEN, Esperanto-Panorama |
| (Koncize: aldone) | 100 BF | |

Fleja havas en 1982 122 membrojn kaj 7 patronojn.

2.2. Kotiztabelo:

Ĝi donas kontentigajn rezultojn kaj estas denove uzata post etaj ŝanĝoj por la jaro 1983. Tamen la propono de Fleja aldoni novan membrokategorion (membreco + Koncize: 220 BF) ne estis akceptita de la FEL-estraro por eviti, ke la membrokotizo de Fleja estus pli alta ol tiu de FEL; cetere ni devus tiam krompagi pro administraj ŝanĝoj.

3. Financoj:

Financa raporto: vidu aldonaĵon de Ite Tytgat.
Ite havis kelkajn malfacilaĵojn por labori kun kontoj, por kiuj laŭ la malnova Ŝtatĵurnalo ne estas menciita ŝia nomo por subskribi. Ĉio devas esti aranĝita dum la venonta jarkunveno kaj poste publikigita en la Ŝtatĵurnalo.

4. Rilatoj:

4.1. Rilatoj kun TEJO:

4.1.1. TEJO-komitatanoj 1983: Wim Tytgat kaj Gerd Jacques elektiĝis. Pro demisio de Gerd restas nur 1 komitatano; tiam estu elektota anstataŭanto.
4.1.2. La du TEJO-komitatanoj de Fleja preskaŭ ne povis ĉeesti la komitatakunsidojn de TEJO en 1982 pro siaj taskoj en la IJK de Leuven.
4.1.3. Fleja pretas finance subteni (3000 BF) la nederlandlingvan eldonon de la raporto pri la TEJO-seminario en Lille "etnaj minoritatoj".

4.2. Rilatoj kun FEL:

Ofte mankis Fleja-reprezentanto en la kunsidoj de FEL. En 1983 ni klopodu pliboniĝi tion.
Por eviti, ke laboro estas farita dufoje, necesas intensaj kontaktoj kun FEL. Tiucele Fleja ricevas la protokolojn de FEL kaj inverse pere de la revuo Informilo.

4.3. Rilatoj kun NEJ:

Fleja transprenas de NEJ kvanton da kvarlingvaj varbbroŝuroj pri Esperanto por dissendi al junulargastejoj. La broŝuro estis redaktita de NEJ.
NEJ-semajnfino en Hoeven okazis dum pasko 1982 kun kunlaboro de Fleja.
Fleja-NEJ-renkontiĝo en Lichtaart (aŭtuno 1982).
Kuna redaktado de la revuo Jen.

4.4. Rilatoj kun BEMI (Ilse Jacques):

Estis la biciklaj ekskursoj, organizitaj en kunlaboro de BEMI.

Okazis du ekskursoj, unu dum la IJK kaj unu dum la UK. Ankaŭ karavano estis organizita de UK al IJK. Same okazos al Hungario.

4.5. Rilatoj kun AFS (Ilse Jacques):

Kun AFS la kontaktoj iom forfalis, ĉar la kontaktpersono translokiĝis de AFS Antverpeno al la eŭropa organizo.

5. Kunsidoj:

5.1. Estrarkunsido 20.01.82 en Antwerpen
5.2. Jarkunveno 07.03.82 en Antwerpen
5.3. Estrarkunsido 07.05.82 en Antwerpen
5.4. Estrarkunsido 26.08.82 en Antwerpen
5.5. Estrarkunsido 01.11.82 en Lichtaart
5.6. Estrarkunsido 22.01.83 en Antwerpen

6. Interna informado:

6.1. En la estraro:

6.1.1. La Regularo de Interna Ordo estas akceptita kaj definitiva.
6.1.2. Gerd Jacques demisias la 1an de novembro.
6.1.3. Divido de la taskoj: ni urĝe bezonas plian estraranon pri eksteraj rilatoj. André Staes promesas, ke li serĉos volontulon.
6.1.4. Kiki ekzamenas leteron pri VZW, senditan de la ministerio pri financoj, kaj same ŝi ekzamenas la kondiĉojn, por ke Bestuur voor Jeugdvorming rekonu junularorganizon.

6.2. JEN:

6.2.1. Por la preparado de unu numero de JEN bezoniĝas 23 laborhoroj, kiuj ne estas pagitaj. Tiujn ĉi horojn Gerd Jacques ĝis nun kromlaboris, sed nun estraranoj (kaj aliaj) laboras semajnfine, por fari la kunmetadon kaj ekspedon de JEN.

6.2.2. Multe da artikoloj estas skribitaj fare de nederlandanoj, escepte la serio pri esperantistaj asocioj kaj EK (tekstoj skribitaj de Fleja-anoj). Estas petita, ke Herman Deceuninck, la redaktoro, ankaŭ uzu interesajn artikoletojn de la FEL-gazetara servo, por meti kelkfoje en JEN.

6.2.3. Okazas laborsabatoj en Hago por redakti Jen.

6.2.4. Proksimume 360 personoj ricevas JEN.

6.3. KONCIZE:

6.3.1. Fleja provizore daŭrigas sian kunlaboron al Koncize kaj la decido tiurilate okazas dum la jarkunveno.
6.3.2. La revuo havis malpli da malfruo ol en 1981. Ĉiun fojon aperas Fleja-kontribuaĵoj en ĝi. Por la unua fojo Koncize ne plu estas inkluzivita en la membrokotizo: oni devas aparte aboni ĝin. Tio kaŭzis konsiderindan falon de la abonantaro.
6.3.3. (redaktas Wim Tytgat): la kvanto da ekzempleroj de Fleja estas 50, kio donas al ni duonan paĝon. La redaktoro mem devas tajpi nun la tekston, kiu aperas tiel en Koncize. Koncize restas interesa maniero, por informi la esperantistojn pri aktivecoj.



6.4. Interŝanĝoj:

6.4.1. Interŝanĝoj kun PSEK: Kiki invitos Polojn por la venonta Fleja-renkontiĝo. Pro la politika malstabileco de Pollando, ne aperis ĝis nun informoj pri tiu en JEN.
6.4.2. IJK-Debrecen: sekve al la interŝanĝo kun 5 Hungaroj, 5 Fleja-anoj (3 malpli ol 26j, kaj 2 pli ol 26) povas iri al Debrecen interŝanĝe.

7. Oficejo:

Multe da laboro por Fleja povis esti farita dank' al la ekzisto de la Esperanto-Centro kaj dank' al la sindediĉo de la deĵorantoj tie, ĉefe Gerd Jacques kaj Jean-Pierre VandenDaele. Ankaŭ volontuloj laboris tie por Fleja.
La BTK-projekto finiĝis. Se Jean-Pierre ne povos eniri kroman laborigkadron (derde arbeidscircuit) kaj depende de estonta necerta laborebleco, li verŝajne ne plu povos plenumi la nunan sekretarian taskon.

8. Renkontiĝoj:

8.1. Intaj:

8.1.1. Hoeven: NL (9-12/4): paska NEJ-semajnfino kun ĉeesto de Fleja kaj kun LKK-kunsido de la IJK Leuven.

8.1.2. UK: (24-31;7): junulartago la 29an de julio en Oranjehuis: Antwerpen. Ĉeesto de proksimume 150 personoj, vespere ankaŭ UEA-estraranoj kaj la prezidanto de UEA. La programo konsistis el serĉrondirado tra Antwerpen, tag- kaj vespermanĝoj, speciale preparitaj, popolgrupa prezentado kaj dancvespero.
Dum la UK funkciis konstanta informbudo pri la IJK-Leuven. Junuloj partoprenantaj al la IJK, povis senpage aliĝi al la UK. Fleja dankas la iniciatintojn pro tiu decido.

8.1.3. IJK: (31/7-7/8): Leuven, ĉeesto de 350 personoj; kunlabore kun Fleja, temo: scienco kaj socio; interŝanĝoj kun Hungaroj-Flandroj. Konsiderinde malmulte da Flandroj partoprenis ĉi tiun kongreson.

8.1.4. Lichtaart 82 (29/10-1/11): proksimume 130 partoprenantoj, precipe unutagaj; Temo: saneco, alternativa kuracado. Estis organizitaj kelkaj specialaj aktivecoj, ĉar la renkontiĝo okazis por la kvina fojo, kaj sekve ĝi estis jubileo por Fleja. La subvenciraporto ne estis farita, pro nereago de la ministerio de nacia eduko kaj nederlanda kulturo al nia subvencipeto.

8.1.5. Kalmthout: Fleja prizorgis la vesperan programon laŭ peto de la Esperanto-grupo La Erikejo la 26an de februaro.83, okaze de la Tago de la Internacia Amikeco.

8.2. Ontaj:

8.2.1. IJK- Debrecen: (23-30/7/83): aliĝiloj kaj unuaj bultenoj ĵus alvenis.
8.2.2. 6a Fleja-renkontiĝo: la kutima renkontiĝo okazos nun en Wavre de la 28a ĝis la 30a de oktobro 83; temo: mediprotektado. Jan Erreygers kaj André Staes finlaboras la aliĝilon antaŭ pasko.

8.3. Borsoj:

8.3.1. Kelkaj anoj de Fleja estis kunlaborantoj en la Naturborso en Antwerpen.
8.3.2. La partopreno de Fleja al la fama "Boekenbeurs" en Antwerpen ne povos okazi.
8.3.3. Fleja ne partoprenis la lingvoborson en Heizel pro samtempa FEL-estrarkunsido.
8.3.4. Al la borso de la Rode Vaan (Ruĝa Drapo) je 11-12/9 Ilse Jacques iris.

9. Eksteraj rilatoj - Varbado:

9.1. Pasporta Servo: por 1982 Ite pagis al Jeanne-Marie Cash 25 libretojn. La kajero alvenis ege malfrue. Espereble ĝi ne plu havos tian malfruon en 1983. La kajero de 1983 estos presita en Hamburgo, en la Esperanto-Centro de la Germana Junularo. Ite faros enketon pere de Informilo por akiri ĝisdatajn informojn pri la gastigantoj.

9.2. ECB: Kiel TEJO-komitatano Kiki emfazas la avantaĝojn rilate al la aliĝo de TEJO al ECB: se TEJO estas aktiva, iliaj seminarioj estas senprobleme subvenciataj, estante membroorganizo de ECB. Krome facile eblas kontaktoj kaj kunlaboro kun la aliaj junularorganizoj, aliĝintaj al ECB. Gerd Jacques kontraŭe prikonsideras la malavantaĝojn: nome la grandan sumon, kiun TEJO devas pagi ĉiun jaron por la aliĝo, kaj la grandan sumon, pagitan komence por membriĝi.

9.3. Pri la prezentado de Fleja al diversaj kursanoj en la lando nenio okazis, krom kontaktoj de Kiki en Aalst kun junuloj dum la provinca kunsido de FEL (5/02/83).
Denove montriĝas klare la neceso je estrarano pri eksteraj rilatoj.- specife: varbado.

9.4. Faldfolioj por junulargastejoj: Ilse akordiĝis kun la centralo de flandraj junulargastejoj, ke ili distribuos tiujn kvarlingvajn varbbroŝurojn pri Esperanto, kiujn Fleja disponigas al ili. Ite aranĝos kun NEJ la pagon por 3000 ekzempleroj.

9.5. La projekto de nova faldfolio pri Fleja estis prezentita komence de tiu ĉi jaro.

9.6. Varbiloj de UEA/TEJO: Ite mendos ilin por la libroservo.

9.7. Estraro por Junulareduko: (Bestuur voor Jeugdvorming): Kiki esploros denove la akceptkondiĉojn por aliĝi al tiu ĉi instanco.

10. Diversaĵoj:

10.1. T- kaj ŝvitĉemizoj:

10.1.1. T-ĉemizoj: blankaj kun verda desegno (katedralo + stelo) kun la mencio Esperanto-kongreso, Flandrujo. La desegno estis farita de Luc Van Gool kaj la ĉemizoj estis venditaj ĉefe dum UK kaj IJK.
10.1.2. Ŝvitĉemizoj: bluaj kun flanke malgranda blanka emblemo pri Esperanto. Pro tre bona vendiĝo ili devis esti remenditaj duafoje.



10.2. Insignoj: Fleja kunlaboris al la farado de la kongresinsignoj de UK kaj IJK.

10.3. Libroservo: Rilate al la problemoj de libroservo en Belgio, Fleja atendas la diskutojn pri ĉi tio en FEL.

10.4. Fleja disponas pri titolita leterpapero, ĉefe por la estraranoj.

11. Konkludo: La jaro 1982 estis por Fleja la tempo de la IJK en Leuven kaj de la jubilea renkontiĝo en Lichtaart. Car tiuj du aranĝoj postulis sufiĉe da prepartempo kaj sindediĉo, eble aliaj eroj de nia agado estis iom neglektitaj. Ili tamen en 1983 ricevos pli da atento.

oOo

Tiu ĉi jarraporto estis kompilita de Jean-Pierre VandenDaele, helpe de Kiki Tytgat. La 6an de marto ĝi estis aprobita de la ĝenerala jarkunveno.

12. Uzitaj mallongigoj:

APE: Association pour l'Espéranto (Asocio por Esperanto)
AVI: Aldona Valorimposto
BEMI: Biciklista Esperanto-Movado Internacia
BTK: Bijzonder Tijdelijk Kader (speciala dumtempa kadro)
CJP: Cultureel Jongerenpaspoort (kultura junularpasporto)
ECB: Eŭropa Kunordiga Buroo
FEL: Flandra Esperanto-Ligo
FLEJA: Flandra Esperanta Junulara Asocio
GCA: Grafika Centro Antverpeno
IJK: Internacia Junulara Kongreso
UK: Universala Kongreso
Jen: Jongeren Esperanto-Nieuws (Junulara Esperanto-Novaĵoj)
LKK: Loka Kongresa Komitato
NEJ: Nederlanda Esperanto-Junularo
PSEK: Pola Studenta Esperantista Komitato
TEJO: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
UEA: Universala Esperanto-Asocio
VZW: Vereniging Zonder Winstoogmerk (Asocio sen Profitcelo).

FLEJA Protokolo de la ĝenerala jarkunsido de dimanĉo, la 6a de marto 1983 je la 10h en la Esperanto-Domo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Ĉeestas: Herman Van Eyndt, Wim, Ite kaj Kiki Tytgat, Jan Erreygers, Jean-Pierre VandenDaele, Lucrèce Decostere, Ilse Jacques, Myriam Ruysschinck kaj Agnes Moens (ekde 11h15), Kris Suykens, Gerd Jacques, Anne Tilmont kaj André Staes (ekde 11h15)

senkulpigis sin: Guido Schroeyers

TAGORDO

Elekto de gvidanto de la kunsido (Kiki), de protokolanto (Jean-Pierre) kaj akcepto de la proponita tagordo.

Post la bonvenigo de Kiki Tytgat komenciĝas la kunveno.
Aranĝo de praktikaj eroj: tagdivido, lunĉo, repago de vojaĝkostoj.

1. Aprobo de la protokolo de 7.03.1982

Estis en ĝi du eraroj: sur paĝo VI: la dato estu 07.03.81, kaj sur paĝo XII: INTERNA REGULARO, forfalu la vorto "propono". Post ĉi tiuj ŝanĝoj la protokolo de la pasintjara jarkunveno estas unuanime akceptita.

2. Jarraportoj 1982

2.1. Morala raporto de la prezidanto: unuanime akceptita.

2.2. Fakta raporto de la sekretario: unuanime akceptita post ŝanĝoj.

2.3. Financa raporto de la kasisto: unuanime akceptita.

Ni ne plu voĉdonas pri la buĝeto por 1983, jam prezentita de Fleja al Fel dum 1982.

2.1. - 2.2. kaj 2.3. estos ankaŭ tre resume prezentataj dum la jarkunveno de Fel.

2.4. Voĉdono: Wim Tytgat trarigardas la membroliston por scii, kiu rajtas voĉdoni. Ekestas iom da problemoj pri la interpreto de subtenanta ano.

La prezidanto dankas nome de Fleja Gerd Jacques pro ĉiu farita laboro per donaco.

3. Elektoj (prezidas Wim Tytgat)

Post la eksiĝo de la antaŭa administrantaro elektiĝas nova:

3.1. Administrantoj: jenaj kandidatoj estas grupe elektitaj unuanime: Wim, Kiki kaj Ite Tytgat, Jean-Pierre VandenDaele, Jan Erreygers, Ilse Jacques.

3.2. Estraro - Taskitoj: la samaj personoj estas akceptitaj unuanime por la estraro. La taskoj estos dividitaj dum la venonta estrarkunsido.

Dirk de Weerdt estas redaktoro por JEN (flandraj kontribuoj), Wim Tytgat plue por Koncize (Fleja-paĝo) kaj Ite pluprizorgos la Pasportan Servon. Ilse respondecas pri la rilatoj kun Bemi kaj Ludaka.

3.3. Prezidanto: Kiki elektiĝas kiel prezidanto kun 5 voĉoj por; Kiki mem sin detenas. Ŝi akceptas, kondiĉe ke Wim transprenos la prezidantan taskon, kiam li havos la eblecon (verŝajne en septembro). Pro tio Wim estas nun vicprezidanto.

3.4. Revizoroj: Kris kaj Myriam estas denove unuanime elektitaj revizoroj pro sia bona laboro en 1982.

3.5. TEJO-komitatanoj: Wim estis jam elektita. Ĉar Gerd opinias, ke ŝi kiel ne-ano de Fleja, ne povas esti TEJO-komitatano, André Staes provizore kandidatiĝas kaj estas akceptita unuanime.



3.6. Ŝtatĵurnalo: Wim kaj Jan Erreygers prizorgos tion.

3.7. Membrolistoj: Ili estos deponitaj de Ilse ĉe la Aktuarejo de la Ĉeftribunalo (Rechtbank van Eerste Aanleg).

(Kiki distribuas leterpaperon, titolitan kun Fleja, al la estraranoj. Estas havebla pli)

ĝis 12h45 Paŭzo

Komenco: 14h00-16h00 (ĉeestas krome Jo Vermuyten kaj Katharina Frison)

4. Onta agado

4.1. Renkontiĝoj

4.1.1. WAVRE Principa rezervo de la ejo estas en ordo. Aliĝiloj estas pretaj je Pasko kaj certe distribuotaj en FRGermanio kaj Valonio. Ĝi ankaŭ aperos en Koncize. La kuireja servo ankaŭ foje iros inspekti la kuirejon. Temo: mediprotektado; programo: ĝenerala malfermo (kun spertulo pri la fako, D-ro Roel de Wolf, de UIA). Jan malfermas en Leuven apartan konton por la renkontiĝo. Li respondecas pri la distribuo de la aliĝilo: en Jen, al GEJ, JEB, JEFO, TEJO, Valonio, PSEK ...
Jan ricevas de Gerd la necesan materialon kun informoj pri antaŭaj renkontiĝoj (i.a. la konsumado de trinkaĵoj). Jan aparte notos siajn laborkostojn por repago kaj sendos la informojn pri la renkontiĝo al jenaj revuoj: Informilo - Jen - Koncize (Wim) - Heroldo de Esperanto - Esperanto-Panorama- Esperanto 2000 - Espéranto en Marche - Esperanto en Belgio ... kaj aliaj revuoj.

4.1.2. Kalmthout La Tago de la Internacia Amikeco plaĉis al la ĉeestantaro. Se tiu ĉi aranĝo estos denove organizita de la Esperanto-Grupo "La Erikejo", ni povos denove kunlabori, se ili petas tion.

4.1.3. Belga Kongreso en Leuven okazos de la 9a ĝis la 11a de septembro 83. Fleja eble faros la libroservon tie; se jes, ni povas pagi reklamanoncon pri ĝi en la kongreslibro. Estos 30% da rabato por junuloj ĝis 26 j. La aliĝilo estas preta en marto kaj Fleja povas helpi al ĝia distribuado. Marc Vandenbempt petas la kunlaboron de Fleja-junuloj por la praktika laboro dum la kongreso.

4.1.4. IJK - Debrecen: Dré Staes kaj Anne Tilmont (pli ol 26 j) estos interŝanĝitaj kaj pagos sian kotizon al Ite.

4.2. Revuoj

4.2.1. JEN

En unu jaro entute 150 ne pagitaj laborhoroj estas bezonataj por finpretigi Jen. Tiu ĉi laboro estas farita de volontuloj: Fleja helpu entute 25 horojn ĉiun duan monaton en GCA por Jen aŭ eventuale por alia revuo, ekspedita de GCA. GCA devas tamen KLARE ANTAŬE anonci al Fleja, en kiu semajnfino oni antaŭvidas laboron por Jen aŭ por alia revuo. Prezoj de Jen kaj aliaj problemoj rilate al la revuo (tro da paĝoj - tro kosta) estos priparolataj dum la NEJ-GEJ-renkontiĝo en Ruinen (NL, ĉieliro). Jean-Pierre skribos leteron al Henk Diender por peti tiun kunsidon. Laŭeble Dirk, Ite kaj Kiki iru al Ruinen por tio.
Redaktoro por Flandrujo estas nun Dirk De Weerdt, respondeca eldonisto restas provizore Herman Deceuninck; Kiki parolos kun li pri tio.

aldono al la jarraporto

BALANS 1982

| AKTIEF | | PASSIEF | |
|---|---|---|---|
| saldo 010182 | 15827 | saldo 311282 | 126059 |
| stokvermeerdering | 80000 | tijdschriften | 29356 |
| lidgelden | 19840 | | 5187 |
| boekenverkoop | 154841 | boekenaankoop | 132353 |
| weekend | 88145 | weekend | 63929 |
| | 38344 | " admin. | 17271 |
| giften | 3265 | administratie | 6107 |
| | | subsidies hongaren | 20000 |
| | 400262 | | 400262 |

RESULTAAT BALANS

| kas 311282 | | kas 010182 | |
|---|---|---|---|
| kas | 14159 | kas | 11000 |
| pĉk | 27589 | pĉk | 4827 |
| KB | 9400 | | |
| UEA | - 5089 | | |
| stok | 80000 | winst | 110232 |
| | 126059 | | 126059 |

Nagezien en goedgekeurd
op 4/3/83

A.C. [signature] [signature]



Tiuj ĉi ŝanĝoj aperos en Jen; Kiki donos ilin al GCA, kiam ili estos definitivaj.
Katharina pretas skribi tekstojn por EK, Dré kontrolos ilin.
EK ŝin direktu ne nur al sia kutima legantaro (malpli ol 16 j), sed ankaŭ al komencantoj pli aĝaj.
Jean-Pierre finkontrolos la tekstojn de Jen por Fleja, antaŭ ol ili estas presataj de GCA. La 23-24/4 kaj 25-26/6 okazos en Hago laborsemajnfinoj por Jen. Fleja klopodos sendi helpanton, kies vojaĝkostoj estos repagitaj de Fleja. Kiki serĉas helpantojn por finpretigi Jen 83:2 venontan semajnfinon (12-13/3): Ite, Jan kaj Jo anoncas sin.

4.2.2. KONCIZE

Abonkvanto: 12 personoj, inkluzive estraranoj (patronoj ?). Tamen bezoniĝas 30-35 abonantoj, por ke Koncize estu pagebla al Edistudio. Por propagandi ĝin, ni distribuu la revuon dum kursoj kaj klubkunvenoj kaj sendu ĝin al interesitoj. Kiki laŭtlegas longan liston de Fleja-aktivuloj, kiuj ne abonas Koncize. En la revuo mankas ankaŭ flandraj kontribuoj, ne skribitaj de Wim.

4.3. Eksteraj Rilatoj - Varbado

4.3.1. Faldfolioj por junulargastejoj: Ite pagos 2500 ekz. al NEJ.

4.3.2. Nova faldfolio pri Esperanto por junuloj en kunlaboro kun NEJ estos prezentita dum venonta estrarkunsido. Laboras al ĝi: Jean-Pierre kaj Gerd.

4.3.3. Pasporta Servo: la kajeroj 83 ne jam estas pretaj. Ite preparos varbfoliojn en la nederlanda lingvo, kunlabore kun NEJ. Ankaŭ Anne Tilmont petis tion flanke de GCA.

4.4. Libroservo

Ni atendas la starpunktojn dum la FEL-jarkunveno.

4.5. Oficejo

Ekzistas la ebleco labori por Fleja en GCA fare de volontuloj (vrijgestelden van stempelcontrole) kaj BTK-anoj, se ne estas multe da alia laboro farenda. (Jean-Pierre, Anne, Lieve, Jan Van Gorp kaj Guido Baeyens). Tio ne ĉiam eblas !
Ite TRE INSISTE petas, ke Jean-Pierre notu ĝenerale la elspezojn de GCA por Fleja. Tiu listo estu poste por ŝi klarigilo kaj direktilo por la nepreciziĝitaj pagendaj sumoj sur GCA-fakturoj al Fleja.

5. Diversaĵoj

5.1. PSEK (interŝanĝoj)

La Poloj estas pretaj fari ĉi tiun interŝanĝon, tamen ĝis nun nenio efektive realiĝis. Kiki skribis intertempe al Paweł Janowczyk kaj espereble Dré, Bob kaj Gerd sukcesos paroli pri la tuta ideo dum sia restado en aprilo en Pomiechówek (PL). Ni ĉiuokaze invitos 4 Polojn por Wavre.

5.2. Patronoj de Fleja (1984)

la varbado okazos en Leuven dum la belga kongreso en septembro.

5.3. Insignoj

La insignoproduktilo fariĝos propraĵo de Fleja post pago al Gerd de la ŝuldita sumo. Gerd devas surpaperigi unue la donacon.

Eksteruloj mendu insignojn ĉe Gerd Jacques, kiu respondecas pri la materialo (mendoj k. a.). Fleja-anoj faras mem la projektojn kaj la insignojn.

Prezoj: petitaj de Ilse: ekde 20 BF (15 BF se la mendinto mem surloke produktas la insignojn)
15 BF por Esperanto-organizoj kaj por grandajn mendoj. Por ĉiu granda mendo ni surpaperigu apartan interkonsenton.

Jan: Fleja nur faru insignojn por propra uzo kaj por vendi en la libroservo. Ankaù Fleja faru laùpete de aliaj Esperanto-organizoj, sed ne por kiu ajn, ĉar konstanta insignoproduktado simple ne apartenas al la celoj de Fleja kaj postulas krome tro da tempo de niaj homfortoj. De tempo al tempo la insigno-farado povas laùbezone esti bona financa rimedo.

5.4. Financa helpo al FEL

Gerd proponas deponi sumon ĉe FEL sur la "Groene Rekening" kun rentumo de 6%. La propono povas nun esti malfacile konsiderata.

5.5. Eùropa Junulara Fonduso (Bruselo)

Kiki petàs la kondiĉojn por ricevi subvenciojn de tiu VZW por semajnfino en eùropa kadro. Ilse kandidatiĝos por la Komitato de tiu fonduso; Kiki skribos la projektotekstojn por ŝi.

5.6. Anne pretas aparte mencii financajn donacojn al Fleja en Esperanto-Panorama. Tio povus esti kroma stimulo por la homoj.

5.7. Myriam Ruyssinck donos al Anne la adreson de la antverpena junulara konsilio. Estus interese por Fleja, kontakti ilin.

5.8. Ite povas farigi novajn ŝvitĉemizojn ĉe konatulino. Ŝi ricevos de Jan adresojn, kie ĉemizoj estas pli malmultekoste aĉeteblaj.

5.9. Dirk anoncas la starigon de Fleja-kabaredo - kaj skeĉo-grupo. Li ricevas entuziasman aplaùdon kaj tuj fariĝas "Fleja komisiito pri artaj aranĝoj".

Per tiu ĝojiga anonco finiĝas la jarkunveno. Fino: 16 h

Poste sekvas regalo de la prezidanto al la aktivuloj, kiuj eltenis la kunsidon, de vino kaj torto.

Fino: ..?



personoj okupiĝas. Jen kreiĝis du novaj laborgrupoj rilate al respektive "kiel trovi la necesajn fontojn" kaj "kiel bremsi la elspezojn". Tiuj laborgrupoj agas principe ekster la estraro. Brila ideo de Petro De Smedt. Bonega rimedo por devigi nin al daùra atenta kaj serioza gvidado de la tuto. Klara indiko ankaù ke la t.n. "bazo" interesiĝas pri la gvidado kaj akceptas tute libervole parton de la respondeco. Dankon al tiuj bonvolemuloj.

Alia bona agado ekis. La komisiono pri intergrupa agado iniciatis denove la provincajn ĝeneralajn kunsidojn. Unu jam okazis antaù unu monato en Aalst, dua sekvos en aprilo en Kortrijk. Tiu iniciato estos daùrigota. Ĝi espereble donos rezultatojn.

Cetere, kaj tio ne estas nova, kvankam pro aliaj organizaj laboroj eble ne plu aktuala, vera kaj intenca agado sur provinca nivelo ŝajnas al mi ege necesa. La tiurilata programo estos pli-ellaborata de la nomita komisiono, gvidata de Hilde Van Ingelgem kaj Trees Dooms. Ni deziras al ili la necesan kuraĝon.

Perdo, kvankam eble ne tuj sentebla, estas la forfalo de nia respondeculo pri la volontula servo. Ni esperas povi reenstali tiun postenon. Vi jam komprenas : ni serĉas anstataùanton !

Por iom paroli pli funde pri tiu volotula servo, eble estas necese reveni al la financa sistemo kaj la nova subvencidekreto.

Supozu ke ni sukcesos plenumi ĉiujn kondiĉojn, tiam la afero ankoraù kostos al ni amason da mono. Jen malgranda kalkulo nemalfacila. La aktivecoj estos subvenciotaj je - ne konsterniĝu ! - po BF 500,- do ne sufiĉe eĉ por kovri la nurajn organizajn kostojn. La personarkostoj estos subvencieblaj je 90 % de iu maksimuma ŝtata salajro. Supozu ke ni akiros la maksimumon kaj ke niaj elspezoj ne superos tiun maksimumon, tiam restos je nia konto 10% de la totalo Jen, do. Eĉ se la ŝtato pagos al ni la maksimume eblan subvencion - kaj ne kiel nun nur la duonon - tiam restos ankoraù sufiĉe konsiderinda truo en nia kaso.

En la bilanco vi ankaù konstatos ke la plej granda kosto-sumo troviĝas en la salajroj. El antaùaj kunsidoj kaj protokoloj vi memoros ke la librotenado iĝis tiel komplika, ke ĝi devas estis farita de profesia librotenisto. La plej granda parto de la profesia laboro farita por FEL troviĝas ĝuste en la librotenado Do, se ni trovus iun profesian libroteniston - pensiumitan ekzemple- kiu pretus libervole prizorgi nian librotenadon, ni retrovus seriozan parton de niaj financrimedoj. Vi vidas do kiom grava estas tiu volontula servo.

Normale ni devus ŝtopi la truon pere de kotiozoj k.s., sed jen nova problemo ! Laù indikoj de la Centro, nia membraro, anstataù kreski, malkreskas ! kaj ĉi tie ni troviĝas denove ĉe vi, ĉe la lokaj aktivuloj. Kiel eblas ke ni perdas membrojn ? Kiel ekspliki tiun fenomenon ? Jes, ni scias, vi ne ŝatas tiujn daùrajn ŝanĝojn kaj adaptiĝojn kaj reorganizadon kiujn ni jam aplikis. Ni kulpas, ni la estraranoj, ĉar ni ja kuraĝis peti iom kio preteriras la kutimajn facilaĵojn ! Ĉar ŝanĝi kutimojn preskaù neeltpereblas. Ni scias, tamen ni

devas. Ne estas apuda vojo. Ni nepre kaj neeviteble sekvu la evoluon de la socio en kiu ni vivas. Tion bonvolu kompreni.
Cetere, parolante pri loka agado, evidentiĝis ke malgrandaj grupoj malpli ol dekmembraj kostas al ni monon pli ol ili alportas. Plie eĉ, kiom da aktivecoj havas tiuj grupetoj ? Ĉu vi trovas normale ke por neaktivaj grupetoj ni devas pagi aŭ perdi monon, dum de la aliaj aktivaj grupoj ni akceptus enspezojn ? Permesu al mi do reveni al punkto kiun mi defendas jam de antaŭ pluraj jaroj. Ni devas alveni al provinca agado, t.e. administrado farita provincnivele. Bonan ekzemplon ni jam havas en Limburgo. Tie nome la administrado de la grupoj kaj la rilatoj kun FEL okazas pere de centra persono, Guido Schroeyers. Tio havas plurajn avantaĝojn : kunordigita intergrupa agado, pli bona informado de la grupoj, centra administrado tiel, ke nia Centro havas nur unu librotenadan laboron por la tuta provinco. Imagu ke niaj librotenistoj povus tiel labori kun ĉiuj provincoj, tio ŝparigus al ni grandan nombron da laborhoroj kaj certigus pli bonan, pli koheran agadon. Ni nepre, nepre alvenu al tia sistemo kaj ke ĝi eblas klare pruvas al ni Guido kaj liaj Limburgaj kunlaborantoj.
Do, ankoraŭ foje, kunlaboru kun la komisiono pri intergrupa agado kaj faru al ni la komplezon almenaŭ klopodi kompreni la situacion.
Fakte, ni ĉiuj komencu per ia memkritiko. Se en nia loka grupo la aktiveco malpliiĝas aŭ forvelkas, ni estu sufiĉe honestaj por serĉi - kaj verŝajne trovi -la kaŭzon ĉe ni mem. Ĉu ni mem ne estas la bazo de la malinteresiĝo ? Ĉu ni ne jam tro longe gvidas la grupon; ĉu ne pli bone lasi la lokon libera por nova gvidanto kun pli freŝaj ideoj; ĉu ni ne postulas tro de niaj membroj; ĉu eble ni estas el tiuj personoj kiuj ĉiam havas laboron por la aliaj, sed neniam mem havas tempon; ĉu eble ni forpelas la homojn pro troa altrudemo ? Jen nur kelkaj demandoj kiujn oni povas fari al si mem. Certe estas aliaj.
Tio, kion mi volas fakte diri estas jeno : kiu agadas en organizo celante ĉefe sin mem, celante memgloradon, tiu estos finfine kaŭzo de pereo de la organizo. Kiu vere celas la organizon, tiu facile trovos la forton por, kiam necese, ebligi plibonigon aŭ daŭrigon al aliaj kompetentuloj. Nenio estas pli danĝera ol egoismo aŭ egocentrismo. Alvoki mi volus al ĉiuj malnovaj kaj nature pli-aĝintaj personoj trovi la vojon al la junularo, larĝe malfermi la pordojn al ili por ke nova, freŝa vento trablovu niajn templojn kaj por ke ekestu nova aktiva vivo. Mi certe ne volas esti malafabla, sed fakto estas ke pli ol la duono de nia membraro superas la aĝon de 60 jaroj. Ĉu vi povas imagi ion tian ? Ĉu tio signifas ke niaj antaŭuloj ne pensis pri altiro de novaj fortoj ? Ke ili ne volis cedi al pli junaj elementoj ? Ho, Dio ! Kaj nun ? Mi tute certas ke estas multe da iamaj esperantistoj kaj multe da Esperanto-lernintoj kiuj ne aŭ ne plu aliĝis al la movado. Tion ni ne



lasu. Unua paŝo al bona preparo de nia jubileo povus esti retrovi ilin kiel eble plej multope kaj, se ni ne sukcesos ilin remembrigi, ni eble sukcesos konvinki ilin al abonado de nia revueto aŭ al aĉeto de subtenkarto. Mi ne povas al mi imagi ke ili tion kuraĝas rifuzi. Sed ... kompreneble, persona kontakto verŝajne estos necesa.
Ho, multe pli estas farota ! Multe, multe pli !
Eble ni povos al vi helpi pere de niaj kadrokursoj. Se la du unuaj jaroj estis eksperimentaj, ni nun povos daŭrigi pli serioze kaj intense. Feliĉe, intertempe ni disponas pri nova respondeculo, multe pli kompetenta ol estis la antaŭa. Li estas sociologo kiu bone konas la problemon kaj kiu jam preparis pli larĝigitan programon, pli interesan kaj pli taŭgan : Andre Staes.

Karaj amikoj, daŭrigi mi povus ankoraŭ longe, sed tio ne estas la kialo de nia nuna kunveno. Peti mi volus al vi bone pripensi la aferojn kaj konsciiĝi pri la neceso de tuja eklaboro de ĉiu en komuna agado.

Por tio mi deziras al vi ĉiuj multe da kuraĝo, multe da fido kaj multe da sukceso en viaj klopodoj.

JB

3. Honorigo.

Ĉi jare estas la vico de Fernand Roose por esti honirigita.

J. Verstraeten skizas la longan Esperanto-vivon pli ol duon-jarcentan de Fernand, liajn multajn meritojn kiel i.a. aktivulo en la tiama Flandra Ligo Esperantista, gvidanto de la Bruĝa grupo Paco kaj Justeco, redaktoro de Flandra Esperantisto kaj poste de Sonorilo, recenzisto kaj ĉefe kiel homo.

Ke Jules pravis, pruvis Fernand refutante . . . !

4. Akcepto de la Administrantaro - vidu la organigramon.

5. Estrar-elekto

Eksiĝas ne-rekanditiĝante : Roger De Schepper kaj Jules Verstraeten.

Elektiĝas : Edward Symoens (prezidanto), Hilde Van Ingelgem, Erik D'Hondt kaj Jan Bovendeerd. Por FLEJA : Kristin Tytgat.

La prezidanto dankas la eksiĝintojn prilumante la aktivecojn de RDS, dum JB ripetas la prilaŭdon de Jules, faritan en la pasintjara jarkunsido.

6. Komitatanoj por UEA

Belga Esperantomovado rajtas havi 2 komitatanojn A. Normale unu el FEL kaj unu el APE. Elektiĝas kandidato unualoke Edward Symoens. Por la kazo ke APE ne (plu) delegus komitatanon, FEL povus proponi duan. Sin prezentas por tio Wim De Smet.
La sekretario tiel anoncos al BEF.

7. Estonta agado.
JB ripetas kaj alvokas al realigo de agadplano proponita en oktobro. (Bonvolu relegi la protokolon pri la ĝenerala kunsido de 16 10 1982, ĉapitron 4

8. Diversajoj

- Hilde Van Ingelgem anoncas ke je dimanĉo 12-a de junio je 11.15 h. okazos en Aalst "a p e r i t i v a k o n c e r t o" sekvota de komuna manĝo.

Wim De Smet raportas ke en septembro okazos en Bergen op Zoom (NL) festado ĉirkaŭ la monumento de Zamenhof. Li opnias ke FEL povus kunlabori en tiu festado.

Fino je 18.05 h.

---



P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 09 04 1983 en Kortrijk, Urba Biblioteko

---

Ĉeestas : Edw. Symoens (ES), Jules Verstraeten (JV), Erik D'Hondt (ED), Hilde Van Ingelgem (HVI), Trees Dooms (TD) Kiki Tytgat (KT) Fern. Roose (FR) kaj Jan Bovendeerd (JB)

Senkulpigon petis : Paul Peeraerts (PP) pri UEA-taskoj

Prezidas : ES

Komenco : 10.10 h.

1. La protokolo pri la kunsido de 05 03 83 estas aprobita.
Tamen, rilate al protokolo pri la provinca kunveno en Aalst, la sekretario ricevis la rimarkon - pravan ! - ke mankis grava mencio , nome tiu rilate la junularan kunsidon, kiu okazis samtempe en alia ejo de la sama konstruaĵo, kvankam ni pri tio ne ricevis detalojn.

2. Taskodivido
- Prezidanto : Edward Symoens
- Estrarano pri financoj : Erik D'Hondt
- Intergrupa agado : Hilde Van Ingelgem, asistata de Trees Dooms
- Junularo : Kristin Tytgat
- Sekretario : Jan Bovendeerd
La ceteraj taskoj : komisiitoj, -onoj kaj fak-kunlaborantoj restas samaj

3. Kotizoj - ebla sistemŝanĝo
La propono de Ivo Durwael en la ĝenerala jarkunsido, nome anstataŭi la fiks-kotizan sistemon per donaca sistemo (vd la protokolon pri la ĝenerala kunsido 2.1.2.) estas longe kaj detale pridiskutata.
Laŭ ES la komparo kun"Bond zonder Naam"ne estas tute ebla, ĉar laŭ li en BZN regas pli emociaj kaj personaj instigoj ol raciaj.
Diversaj proponoj kaj kontraŭproponoj surtabliĝas, ĉiuj pertinentaj en si mem, sed ĝenerala interkonsento ne eblas.
Propono de la plimulto estas : konservi bazan kotizosistemon kun samtempa alvoko, sed klare esprimita kaj konkretigita, al donacado.
Ekzemplo : FEL intencas daŭre sendi sian revuon al tiuj personoj kiuj petis informojn pri Esperanto aŭ kiuj iam pagis abonon, sed tio kostos tiom, kovrenda per donacoj.
La prezidanto konstatante ke la afero estas tro grave por rapida decido, proponas remeti la aferon en la tagordon de la venonta kunsido kaj bone pripensi ĝin intertempe.
Alia konstato estas ke necesas ne nur mencii aŭ alvoki unu fojon, sed jes ripetadi, daŭre altiri la atenton.
Ankaŭ la menciado de nomoj de la donacintoj en nia periodaĵo ne povas

esti forgesita.

4. Gvidlibro pri grupa agado

TD kunlabore kun PP planas krei specialan gvidlibron por grupa agado. Temas pri manlibro kiu enhavu kiom eble plej da informoj pri la movado monda/landa/regiona/grupa; libreto adaptebla, do, kun nefiksaj folioj interŝanĝeblaj.
Ili serĉas kunlaborantoj por esplori, prijuĝi, plani, decidi pri la enhavo ktp. JB tuj sin proponas por kunlabori, des pli ke li mem jam de certa tempo laboras super tiaspeca verketo, kvankam destinita nur al la estraranoj k.s.

5. SONORILO - Libroservo

Longa diskutado el kiu evidentiĝas ke la rilatoj inter SONORILO kaj FEL tute ne evoluis kiel oni estus povinta atendi, tute ne favore al FEL. Male, eĉ.
Proponoj estas tri :
- distanciĝi de SONORILO kaj krei nian propran libroservon
- peti la maldungon de la dejorantoj
- reordigi la situacion kaj delegi reprezentanton de FEL en la administrantaron de SONORILO.

Decidiĝas ke la sekretario skribu leteron al la prezidanto de SONORILO sciiganta ke FEL-estraro lasas al ili ĝis fino de la proksima monato majo por enordigi la aferon, manke de tio FEL reprenos siajn plenajn rajtojn kaj distanciĝos de SONORILO por iri sian propran vojon.

6. Protokoloj - INFORMILO - ESPERANTO PANORAMA

Por kompletigi la mankon de informado rilate al la laboro de la estraro, komisionoj kaj fak-kunlaborantoj, PP proponis letere ke Anne Tilmont trakribru la protokolojn kaj resume raportu en ESPERANTO PANORAMA.
Aliflanke TD elprenos la plej gravajn kaj interesajn partojn el ili por enmeti en la gvidlibron pri grupa agado.

Fino : 13.00 h.

JB



P R O T O K O L O

Pri la Okcident-Flandra provninca kunsido de 09 04 1983 en Kortijk.

Krom la estaranoj de FEL (vd la protokolon pri la antaŭtagmeza kunsido) kunvenis 20-o da Okcident-Flandron. La listo estas havebla de la sekretario.

Komenco : 14.10 h.

La "scenaro" estas proksimume la sama kiel tiu de la Orient-Flandra kunveno en Aalst je 05 02 1983. (vidu INFORMILO-n de februaro 83)

Post bonvenigo de la ĉeestantaro kaj klarigo de la celo de la kunveno (ekkonatiĝo de la membraro kun la estraro de FEL, klarigi la movadan situacion k.s.) la prezidanto invitas al ĝenerala debatado, interkomunikado.
Post superrigardo de la (jama !) historio de FEL : origino, rilatoj kun BEF, APE, UEA, (vd detalojn en la protokolo pri la Orient-Flandra kunsido kaj en tiu pri la ĝenerala jarkunsido) ekestas interesa debato en formo de ideinterŝanĝado el kiu evidentiĝas ĉefe ke estas ankoraŭ sufiĉe granda manko de interna informado. Efektive, diversaj proponoj jam -certaj eĉ delonge - elproviĝis kaj pri ili ni jam raportis en diversaj numeroj de INFROMILO kaj ESPERANTO PANORAMA. Kelkaj ekzemploj : publikigoj de ESPERANTO en telefongvidiloj, kotiz-pli-altigoj (dum oni jam proponis forstreki la kotizojn ! vd la protokolon pri antaŭ-tagmeza kunsido), daŭraj pomonataj pagoj, donacpetoj, fiksdataj mondeponoj k.a.)
Je klarigo, pluraj efektive memoras pri la diversaj klopodadoj jam faritaj. Notende ĉi tie estas tamen ke ne sufiĉas unu fojon mencii, raportadi al alvoki, sed ke necesas regule memorigi la aferojn. Atendotaĵoj por la redaktoroj de niaj revuoj.
Rilate al la lokaj reprezentantoj JB agnoskas , ke fakte la respondeculoj de FEL ne racie reagis al tiuj personoj kiuj sin prezentis por reprezenti FEL en sia regiono. Normale ili estus devintaj sendi almenaŭ dankleteron kun la promeso pri kiel eble plej baldaŭa kontaktiĝo (eĉ se tio ne tuj eblus) kaj eĉ tio ne okazis. Oni do ne miru ke tiuj lokaj aktiv(olont)uloj ne aperas en kunsidoj. Li sentas tion kiel gravan mankon kaj kiel eblan perdon de tiuj personoj, esperante ke la planita provinca agado (vd pli sube) plibonigos tiun situacion.
FR konstatas ke ekz. en Diksmuide ekestis interesa kerno kaj, konstatante certan ne-eblon pri daŭra aktivado, alvokas al pli konsiderinda partopreno en la kadrokursoj kie oni povos lerni kiel gvidi grupon kaj kunvenojn.

INTERGRUPA AGADO

TD klarigas ke la komisiono pri intergrupa agado okupiĝas pri la ellaboro de agadplano, sed komprenebie, por renkonti la dezirojn de la koncernaj grupoj kaj membroj, necesas koni ilajn preferojn.

Kunvenoj kiel la hodiaŭa ĝuste servas ankaŭ kaj ĉefe eĉ al tio.
TD petas do kiel eble plej aperte kaj honeste esprimi siajn pensojn.

PROVINCA ADMINISTRADO

Ĉi tiu punkto fakte interplektiĝas kun la antaŭa.
JB, post klarigo de la financa siutacio rilate al malgrandaj grupoj malpli ol 10-membraj (vd ankaŭ la 'Raporton de la sekretario' en la protokolo pri la ĝenerala jarkunsido) substrekas la neceson de provincaj agado kaj administrado.
Kandidatiĝas kiel provinca respondeculo, ni diru "provinca prezidanto":
Roland Rotsaert, helpota de Fern. Roose.

DIVERSAĴOJ

HVI memorigas pri la "aperitiv-koncerto" kiu okazos, profite al FEL, en Aalst je dimanĉo 12-a de junio je 11.45 h.

Same pri la junulara semajnfino en Waver, la lastan semajnfinon de oktobro.

JB atentigas pri konferenco rilate al la preparo de la 100-jariĝo de Esperanto en 1987, kadre de la plilarĝigita kunlaboro Flandra/Nederlanda kaj kiu okazos en Vlaardingen la 28-an de majo 1983.

ES raportas ke, okaze de la kongreso en Leuven en septembro ĉi-jare, festprelegos M. Coppieters.

Venonta provinca ĝenerala kunsido okazos en Leuven la 4-an de junio por la provinco Brabanto.

KONKLUDO

La prezidanto esperas ke la hodiaŭa kunveno estos embrio de venonta agado tiel provincnivela kiel tut-flandra favore al realigo de la universala agado necesa, certe en la tuja estonteco, por sukcesigo de la ĝenerala informado kaj jubileado.

Dankante ĉiujn kaj dezirante al ĉiuj multe da sukceso kaj kuraĝo, li fermas la kunsidon je
16.35 h.

JB



PROTOKOLO

Studtago pri novaj financaj fontoj.

Ĉeestis : De Smedt, D'Hondt, Amant, Tilmont, Claeren, Schroeyers, Rotsaert, Verstraeten, Van Ingelgem, Dooms, Van Daele, De Vleeschhauwer, Staes, Nagels, Jacques, Böhme. Dato : 12-3-1983
Prezidis : 14.00 h - 15.00 h = Staes
15.00 h - 18.30 h = De Smedt

Skizo de la situacio : la konto de FEL suferas grandan deficiton. Precizaj ciferoj estas troveblaj en la librotenado. Oni konsideras la situacion malfavora. Pro tio oni starigas du komisionojn :

1) Unu komisionon de, ni diru, fantaziemuloj, kiuj inventos rimedojn por repozitivigi la saldon en la librotenado de FEL kaj
2) alian komisionon de kritikistoj, kiu ekzamenos la elspezojn, analizante la librotenadon.

Celo de tiu ĉi kunveno : kolekti ideojn por rebonigi la financan staton de FEL. Oni ne parolos pri elŝparado sed pri novaj enspezoj. Oni inventu kaj ne kritiku.

Planoj :

1. LOTERIO por ekstera publiko (neta gajno, eble 10000 Bfr.)
   LOTLUDO por interna publiko (tombolo)
   - oni konsideru la impostajn konsekvencojn
   - oni taksu la administrajn laboron kaj kostojn
   - oni komparu la ideon pri la hazardludoj kun la jam ekzistanta ideo de SUBTENKARTOJ. Kiu sistemo pli enspezigos?
   - spertojn oni jam havas en la Limburgaj lokaj grupoj

2. BENEFICO KUN ARTISTOJ : okazaĵo malfermita al vasta publiko
   - la artistoj laborus senpage aŭ kontraŭ malalta pocento (ekz. : Herman Elegast kaj/aŭ similaj)
   - Van Ingelgem proponas orgenkoncerton. Priparolos la eblecojn kun sia edzo, Christian, fama orgenisto

   okazaĵo por limigita publiko
   - mem prezenti teatraĵon, kabaredon. Tiucele cirkonstanca teatra grupiĝo estos starigota

3. BALO : malfermita al vasta publiko
   - prefere organizenda en Antverpeno (Harmonie/Romi Goldmuntz) aŭ Bruselo
   - antaŭvendado de tikedoj, ĉiu minimume vendu 5 enirkartojn, orkestro kontraŭ modesta prezo (maksim. 15000 Bfr.) aŭ propra disk-ĵokeo kaj inviti logbirdon
   - prefere laboru kun profesiaj servistoj, sed mem preparu bulkojn kaj zorgu por vendado de floroj (ekz. po 50 Bfr.) kaj tombolo
   - taksia servo necesos
   - atendita neta gajno ekz. 60000 Bfr. aŭ pli

   : kadre de distra semajnfino
   - loĝigadaj enspezoj, ekskursoj, prezo por la tuta semajnfino estu ekz. 3000 Bfr.

4. EKSKURSOJ : enlandaj
   - De Smedt proponas organizi 4 fojojn jare ekskurson

   : eksterlandaj
   - Tilmont pensas pri vojaĝeblecoj kun Leo De Bruyn, kiu pretas organizi benefic‿an vojaĝon

5. KOMERCAJ IDEOJ : cirkonstancaj
   - viandrostadvespero (barbeque)
   - vaflobakado aŭ trink- kaj frandaĵbudo en la birdeta merkato en Antverpeno dum someraj dimanĉoj
   - vendado de disko pri muzika vespero en UK

   : daŭraj
   - vendado de leterpapero kun via nomo k.t.p. (daŭrigo de ekzistanta ideo)
   - partopreno en fatrasa foiro, ĉiu esperantisto kunportu sian rubon kaj vendu ĝin por FEL
   - vendado de esperantaĵoj
   - vendado de E°- vino (H.D.Platz vendas)
   - vendado de E°- parfumo, kolonja akvo (Texier vendas)
   - vendado de aliaj specialaĵoj; pupoj eksterlandaj, spicoj k.t.p. dum la 'naturfoiro' en Van Rijswijck(Antverpeno)
   - reklamo en Panoramo
   - vendado de adreslistoj de esperantistoj al firmaoj
   - serĉi volontulan filateliston kiu vendas poŝtmarkojn uzitajn por FEL
   - peti aliĝkostojn por kadrokursoj (ekz. po 200 Bfr. aŭ 1000 Bfr. por la tuto)



   - vendado aŭ ekspluatado de la delegita reto (ne nur koncernas FEL sed ankaŭ UEA)

Komercaj iniciatoj postulas profesi(ec)an agadon. Oni bone antaŭe kalkulu la eblecojn je neta gajno. Oni kreu merkaton. Se necese starigu juran personecon komercocele.

   : eksterordinaraj
   - investado en la nova vortaro Esperanto-Nederlands. Ekz. aĉetu grandan stokon je malalta prezo kaj poste vendi pli multekoste. Eventuale mem organizi la distribuadon.
   - simbola vendado de la ĝardeno de la Esperanto-Domo. Oni bone interparolu la eblecojn kaj kondiĉojn (ekz. 100 Bfr. po 1 $dm^2$)
   - vendado de komputilprogramoj por specifaj celoj, ekz. lingvoinstruado

6. LIBROSERVO
   - plibonigo de la libroservo
   - partopreno en librofoiroj (ekz. la alternativa librofoiro en Antverpeno)
   - eldoni allogajn literaturaĵojn

7. LA VERDA ŜPARKONTO
   - daŭrigo de la projekto, brue diskonigi ĝin

8. DONACOJ AL FEL
   - plifaciligi la donaceblecojn, diskonigante la vojon por subtrahi vian subtenon de viaj impostoj
   - altigi la fiksitan aŭ proponitan donacon de 1200 Bfr ĝis 2000 Bfr. Oni zorgu ke poste la lokaj kluboj ne postulas kromajn kontribuojn

9. KOTIZO POR MEMBRECO
   - altigi la kotizon (ekz. ĝis 6000 Bfr)
   - varbi pli da dumvivaj membroj

<u>Tujaj rezultoj</u> :
Hilde Van Ingelgem organizos la orgenkoncerton kaj klavicenprezentadon
Hilde Van Ingelgem, Trees Dooms, Anne Tilmont organizos balon

protokolis : Staes

Komunikoj

Kiu volas iri AVIADILE al Budapeŝt (UK kaj/aŭ IJK) ekde Bruselo ? Se ni sukcesos trovi 6 "flugontoj", ni povos ĝui de rabatita prezo : proksimume BF 10.500,- ĉe la flugkompanio MALEV de Hungario. Info : Anne Tilmont p/a Esperantodomo Antwerpen.

-

Kiu havas interesan dokumentadon pri la historio de ESPERANTO en BELGIO, bonvolu havigi al aŭ informi pri tio Fernand ROOSE, St. Klaradreef 59, 8000 BRUGGE.

-

Ni ricevis anoniman leteron, skribitan per verda inko en majusklaj presliteroj. Kiel jam antaŭe anoncite, ni publikos tekstojn nur de personoj al ni konataj. Do, se la sendinto volas ke ni publikigu lian/ŝian leteron, li/ŝi bonvolu kontatigi sin.

-

Reago je reago.

EN INFORMILO de januaro 1983, sur p. 8 numero 8, amiko Rotsaert skizas bildon pri grupo kaj prezidanto de "Paco kaj Justeco" kiu por ambaŭ ne estas flata (tio ne gravas) kaj neĝusta (tio estas pli grava).

1. Ne la grupestro petis plian monsumon, sed la estraro de la grupo.
2. Skribante sennuance pri la "neakurata prezidanto" donas impreson ke tiu neakurateco estas kutima ĉe nomita persono, dum ĝi estas escepta (kiel ĉe kelkaj aliaj simplaj- kaj estraraj gemembroj).
3. Nehejtita kunvenejo" ŝajne kaŭzas malbonan humoron ĉe li. Sed tuj ĉe la komenco de la kunveno oni jes hejtigas ĝin. Kaj intertempe, kiel homoj kun juna koro, ni ŝercas pri tio kaj amuziĝas tiamaniere. S-ro Rotsaert ne.
4. Neniam li legis aŭ aŭdis pri tia decido de kotizaltigo. En tiu kazo li aŭ ne ĉeestis la kunvenon, aŭ ne atentis pri tio.

Fina rimarko : la kunvenhoro estas la 20-a kaj, multnombre aŭ malmultnombre, ni komencas la programon (kiu ĉiam estas varia) je la 20,15-a horo.

Fernand Roose.

-

Por gvidantoj.

- Kiam vi malfortiĝas, ili (la membroj) eraros.
- Kiam vi eksidas, ili ekkuŝos
- Kiam vi dubas, ili malesperos
- Kiam vi kritikas, ili malkonstruos
- Kiam vi antaŭe marŝas, ili vin preteriros
- Kiam vi vian manon donas, ili sian vivon donos
- Kiam vi preĝas, ili sanktuloj estos.